

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 4. — APRILO 1928

LA 14^{an} DE APRILO

Jam forpasis dekunu jaroj de kiam la Majstro amata forlasis nin. Ni restadu tute fidele al lia kreitaĵo en plena konkordo; ni sen malkuraĝiĝo kaj deflankiĝo sekvu la rektan vojon montritan de li, ĉar nur tiel ni venigos al la Mondo tagojn, kiam «AMO KAJ VERO EKREGOS SUR TERO».

AL LA MEMBROJ DE H. E. A.

Ĉar la Prezidanto de la Asocio, Ekscelenca Moŝto S-ro Karlo M. Cortezo eksigis pro neebleco atenti la aferojn de la Asocio, ĉar liaj multenombraj oficialaj postenoj kaj maljuneco malpermesas al li tion fari same, kiel li dezirus, la Membroj de la Direktanta Komitato nomis min lia anstataŭanto provizore, ĉar la Kongreso de Sevilla elektos novan Prezidanton. Malfacile estas anstataŭi sukcese tiel eminentan personon, tiel estimindan entuziasman esperantofervorulon; pro ĉi tio mi pripensis, ĉu estus dece kaj konvene rifuzi la honoran postenon, kiun oni decidis al mi; sed rapide mi konsciis, ke kvankam tiu solvo estus prava rilate min, ne estus tia rilate mian situacion en la Asocio, ĉar prave oni povus opinii, ke mi neas mian modestan kapablo-laboron (kiu vere estas sensignifa) al la Asocio dum kvazaŭ organiza tempo postulanta memoferecon kaj noblan kunagadon ĉies, ĝis la alveno de la Kongreso de Sevilla, de kiu H. E. A. eliros firme starigita, potence multenombra, solide unuigita; tial mi min konsciis nepre devigata por akcepti la postenon.

Aliparte, estis kuraĝige por mi, ke D-ro Cortezo restas nia ĉiama Honora Prezidanto; kvazaŭ efektiva Prezidanto, kaj mi kvazaŭ lia dua personeco, ĉar D-ro Cortezo estas kaj estos kun ni tute same, kiel antaŭe, de ĉiuj vidpunktoj, laŭ siaj promesoj kaj niaj decidoj konsideri

lin tia kaj kunagadi kun li, por kio ni konstante estas kaj estos en rilato kun li, utiligante liajn konsilojn, influon kaj meritplenan sperton. Same kuraĝigis min la pardonemeco kaj bonkoreco de niaj kunasocianoj klinontaj ilin al senkulpigo pri nevolontaj eraroj kaj maltrafoj. Nu; mi akceptas, kun danko al ĉiuj, la althonoran posterion, salutante fratkore la Heaanojn kaj samtempe la eulandajn kaj eksterlandajn samideanojn, petante al la enlandaj esperantistoj ankoraŭ ne aliĝintaj al nia Asocio, ke ili grupiĝu ĉe siaj respektivaj lokoj, aliĝu al H. E. A. kaj al Kongreso de Sevilla, ke kiel eble plej multenombre ĉeestu la kongreson por decidi pri nia Asocio kaj antaŭenpuŝo de Esperanto en nia lando. Se ili ĉi tion farus amike, interkonsente, konkorde, laŭ montris kaj lernigis la Majstro, ni povus nin prezenti kiel estas fortika funde enradikiĝinta arbo, kies abunda frukto ekmaturiĝas, impresante la publikon, la aŭtoritatulojn, la Registaron, por ke ili nin helpu kaj efektivigu precipe la enkondukon de Esperanto en la elementaj, mezaj kaj superaj lernejoj, ekstarante tiel ĉefloke en la vicoj de la popoloj, kiuj plej altgrade laboris por la bono, interkompreniĝo kaj interfratiĝo de la Homoj. Jen la deziro de via Prezidanto, kiu resalutas vin.

Vicente Alonso.

MI PAROLAS TUTE KLARE KAJ AGAS LOJALE

Estas nepre necese paroli tute klare kaj agi lojale, gvidate nur de la bono al nia afero; tial mi esprimas mian opinion pri la Prezidenteco de nia Asocio (de H. E. A.) kaj pri aliaĵoj.

La Prezidanto de nia Instituto, per la unua numero de ĉi tiu gazeto, informis tute detale kaj fundamente (laŭ dokumentoj de la Kongreso de Madrido) pri la starigo de la Instituto, klarigante kialon pri la ne elekto de S-ro Inglada por la Prezidenteco spite de lia Akademieco donanta al li nediskutindan rajton por la posteno. Laŭ la lasta paragrafo de la III^a regulo de la Regularo de l'Instituto, estas nepra kondiĉo por esti Membro de la Instituto aparteni al H. E. A., kaj kvankam bedaŭrinde S-ro Inglada ne estas ano de H. E. A., la Instituto tamen konsideras lin sia Membro, atendante ke li, kiel aliaj Institutanoj, aliĝu al nia Asocio, ĉar certe li, kaj la aliaj, ne aliĝis ankoraŭ pro neatentemo kaŭze de sia granda laboro. Ĉi tio sufiĉe bone klarigas esti neeble ankaŭ proponi kaj elekti S-ran Inglada por la Prezidenteco de H. E. A.

Nia Asocio honoris S-ron. Inglada metante lian nomon post tiu de la tutmondfama inĝeniero S-ro. Leonardo Torres Quevedo en la ora tabelo por la plej eminentegaj samideanoj; konsciante lin la plej honorinda, eminenta kaj klera samideano, lin proponis por la Konferenco de Parizo pri enkonduko de Esperanto en la Puraj kaj Aplikataj Sciencoj kaj por la Somera Universitato de nia Universala Kongreso en Ĝenevo, kaj ni trafis, ke la Registaro estu nominta lin por ambaŭ okazintaĵoj. Hodiaŭ, al la nediskutindaj meritoj de S-ro Inglada sumiĝas lia nova, de antaŭ multe gajnita, loko ĉe la Hispana Scienca Akademio, pro kio la Hispana Esperantistaro lin gratulas tutkore, kaj estus malsaĝe opinii, ke li ne meritas la Prezidantecon de nia Asocio; sed nepre necese estas, ke li aliĝu al H. E. A., kaj ke li dediĉu al la Asocio tempon kaj laboron, ĉar ju pli progresas H. E. A., des pli ĝi postulas laboron, kaj estu S-ro Inglada tute certa pri la unuanimeco por lin elekti Prezidanto en Sevilla, kaj la Hispana Esperantistaro sin sentos fiera esti prezidata de li.

Tute klare nia nelacigebla samideano S-ro. Mojado klarigis la fondon de nia Instituto; mi prezentis en la Kongreso de Madrido, per Regularo aranĝita de mi laŭ amendoj de S-roj Emilio Gaston (de Zaragoza) kaj Francisco Azorín (de Córdoba), la Instituton kiel Teknikan Fakon de H. E. A., por lingvoaferoj, instruado, ekzamenoj, k. c., kaj mi agis lojale aranĝinte tiel la Regularon, kiu ne sukcesis, ĉar emo al simpligo klinis la Kongresanojn akcepti novan simplan Regularon prezentitan de S-ro Francisco Azorín, kiu lasis for de H. E. A. la Instituton, kaj ĉi tiu, laŭ la Leĝo, devis esti starigata same kiel iu ajn alia Asocio; pro kio la rezulto estis komplikajo: *du organizaĵoj*. Mi voĉdonis same, kiel ĉiuj, sed miaj opinioj estis, estas kaj estos, ke H. E. I. devas esti fako de H. E. A. Tamen, oni povas diri, ke H. E. I. nuntempe funkciadas orde kvazaŭ fako de H. E. A.; sed la samideanaro povas en Sevilĵa ŝanĝi la nunan organizon.

Ĉi tiu gazeto celas esti utila al mia Biblioteko sed per laboro favoranta la esperantan enlandan kaj eksterlandan movadon; esti utila al Hispanujo per diskonigo de ĝia arta, natura, k. c., trezoro. Tial mi proponis liveri al H. E. A. tiom da specimenoj krom da ili ĝi bezonu por la membroj memvole, NE DEVIGE, pagintaj al H. E. A. tri pesetojn, kiujn siavice H. E. A. transpagu al mi, kaj el kiuj mi, miavice, donu trionon al la kaso de la Grupo «Antaŭen» de Madrido, ĉar mi volas

helpi tiel la propagandan laboron de tiu Grupo. Neniel mi pretendas estu devige por la membroj de H. E. A. pagi la tri pesetojn al la Asocio kaj ke ĉi tiu ilin transdonu al mi; ni nur proponis liveri servon al H. E. A. publikigante ĉion pri nia tuta afero en Hispanujo, havigante tiamaniere al H. E. A. gazeton sen ia elspezo pro eldonado.

Dudekjara, konstanta, fervora, diafana kaj lojala esperanta laboro, precipe dum la plej malfacilaj tempoj por nia afero, kuniginte per la Federacio «Zamenhof» kaj ĝia gazeto «Hispana Esperantisto» la disigitajn esperantistojn en nia lando, elpruas evidentege la celon, kiu ĉiam gvidis min, marŝante ĉiam antaŭen spite de ĉio, ĉar triumfigi Esperanton estas por mi nur la plej atentinda afero.

Julio Mangada Rosenörn

ANTAŬEN EN KONKORDO

Kaŭze de troa originalo, mi ne povis aperigi artikolon titolitan «Pri sintenado de U. E. A.», kaj hodiaŭ mi multe ĝojas ne esti aperiginta ĝin. Ĉi tiun inspiris la flugfolio de nia sperta angla samideano S-ro Montagu C. Butler, kaj cirkulero de ne malpli sperta kaj laborema franca samideano S-ro Georges Delanoue. Feliĉe D-ro Privat tute klare parolis, feliĉe U. E. A. forlasas apartajn opiniojn por reeniri la firman vojon, *la fundamentan vojon*, kaj la Esperantistaro devas sin senti kontenta kaj esperplena. Certe jam neniam ni aŭdos protestojn, kiel tiun de Japano en Danzig; certe jam neniam ni vidos sur paĝoj de oficiala libro de Kongreso, kiel tiu de Danzig, aŭ sur oficiala dokumento, nomaron el landoj nun kun finaĵoj *to* aŭ *land*... Konkordo, fideleco, lojaleco, memkonfido, regu nin!

J. M. R.

VII HISPANA ESPERANTA KONGRESO EN SEVILLA

(DE LA 5^a ĜIS LA 9^a DE NOVEMBRO 1928)

Je la pasinta februaro oni dissendis cirkulerojn de la Kongreso kaj Literatura Konkurso al la tuta esperanta Gazetaro, kun peto raporti iom pri la Kongreso kaj Konkurso. «Verda Stelo» kaj «La Nova tago» de Germanujo helpas nin disigante cirkulerojn, kaj «Utrechta Esperantisto» (Holandujo) aperigis komplete la cirkulerojn per sia marta numero.

Por la Literatura Konkurso venadas originaloj.

Jen nova listo el aliĝintoj al la Kongreso ĝis la 31 de marto:

Número 119, don Angel Sánchez Gómez, de Salamanca; 120, Sociedad Económica Barcelonesa de Amigos del País, de Barcelona; 121, Juan Sánchez García, de Villanueva de las Minas (Sevilla); 122, Rafael Martínez Galera, de Madrid; 123, Francisco Durán García, de Sevilla; 124, Enrique Fernández Martínez, de Sevilla; 125, Francisco Gorgues Torredelfot, de Barcelona; 126, Manuel Bausells Alsina, de Barcelona; 127, Eduardo Cano, de Sigüenza (Guadalajara), 128, Amado Hernández Pascual, de Argujillo (Zamora); 129, Juan Zornoza Caro, de Madrid; 130, Luciano Plaza Sánchez, de Madrid; 131, Juan Barceló Andreu, de Palma de Mallorca; 132, Esperantista Klubo Palma, de Palma de Mallorca; 133, Alberto Díaz, de Bata (Guinea Española); 134, Salvador Oliván, de El Ferrol (Coruña); 135, F-ino María Franco del Capblanco, de Madrid; 136, José Perogordo, de Madrid; 137, Luis Rodríguez Escartín, de Madrid; 138, Julián García Aguirre, de Madrid; 139, José Alfin y Lete, de Madrid; 140, José María Alfin y Delgado, de Madrid; 141, Mariano Ucelay Repollés, de Madrid; 142, Manuel Uriarte Rejo, de Madrid; 143, Grupo Esperantista de Baracaldo, Vizcaya; 144, S-no Petronila García Noriega, de Madrid; 145, Vicente Morera de la Vall, de Burgos; 146, Vicente Moreno, de Madrid; 147, Luis Campos Suay, de Zaragoza; 148, Salvador Pérez Martínez, de Madrid; 149, Gerardo Aja Gómez, de Los Corrales de Buelna (Santander), 150, Ildefonso Montero Díaz, de Toledo.

Laste aliĝis la Provinca Deputataro de Oviedo, dank' al la laboro de la regiona Delegito S-ro Antonio Jiménez Mora, kiu disvolvadas tie tre rimarkindan laboron; ankaŭ la Esperantista Grupo de Baracaldo, kiu donacis 25 pesetojn. Niaj samideanoj de Barcelona promesas agadi varme kaj senlace por varbi gravajn aliĝojn, kaj ĉi tion ni esperas.

Per la sendostacio de Sevilla mi disaŭdigas du fojojn ĉiumonate paroladetojn pri nia Kongreso kaj Esperanto la 1^{an} kaj 15^{an} je la 21 $\frac{1}{2}$ horo, kiam ne estas redisaŭdigo. ĉar en ĉi tiu okazo la paroladetoj okazas sekvantan tagon.

Sevilla 1^{an} de aprilo de 1928.

La Sekretario-Kasisto de la
loka organizanta Komitato,

Carlos Martínez Fernández

Rimarko. -- Korespondaĵojn, kotizojn, mondonacojn sendu al la Sekretario-Kasisto: strato Rioja, 25, Sevilla.

LIBROJ RICEVITAJ

FABIOLA, romano pri la katakomboj de Kardinalo WISEMAN, el angla lingvo tradukita de RAMO, dua eldono reviziita de Em. ROBERT. 15 × 20 cm., 440 paĝoj, 8 luksaj ekster-kaj multaj entekstaj ilustraĵoj. Prezo, afrankite: 35 fr. «Espero Katolika», 55, rue de Vaugirard, Paris-VI. Ĉi tiu romano, kiu naskis alian faman romanon *Quo Vadis*, meritas, de ĉiuj vidpunktoj, lokon ĉe la libraro de fervoraj kaj bonaj esperantistoj ĉar la esperanta adaptigo estas bonega, same kiel la stilo.

KRONIKO

ENLANDA

Madrid.—S-ro Cayetano Redondo klarigas esp-kurson al pli ol kvardek laboristoj kaj certe la nombro da lernantoj pligrandiĝos ĉar la entuziasmo kreskas rimarkante la rapidan progreson. Ĝus oni fondis Esper-Laboristan Grupon.

La Ligo de Hispanaj Fervojistoj sukcese iras antaŭen. La organizantoj ricevis jam pli ol sesdek aliĝojn.

La 5^{an.} de Februaro okazis ĉe «Casal Catala» propaganda festo okaze de malfermo de Esp-kurso kiun gvidas S-ro Johano Calahorra: parolis la Prezidanto de l' «Casal Catala», S-roj Mojado, Alonso kaj Calahorra; fine la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» kantis iujn popolajn kantojn hispanajn kaj fremdajn esper. La ĉeestantaro estis multenombra, kaj interesiĝis pri nia afero.

Pro eksigo de D-ro Cortezo el la Prezidenteco de H. E. A., oni nomis S-ron Vicente Alonso Prezidanto. La unua faro de la nova Prezidanto estis viziti la Ministron de Publika Instruado, por kio akompanis la Prezidanton la Sekretario de la Asocio Pastro Mariano Mojado, kaj la Prezidantino de la Grupo de Madrid, F-ino Mario Franco. La Ministro interesiĝis konante la gravan resumon pri la agado de H. E. A. Ĉi tiu, en kontakto kun la aŭtoritatuloj per sia estraro, atingis gravan sukceson, kiun baldaŭ oni konigos, ĉar la oficiala decido ankoraŭ ne estas aperinta.

Sub prezido de la estraro de H. E. A., la 28^{an.} de Marto, estis sole-

ne malfermata la esperanta kurso ĉe la Palaco de la Poŝto kaj Telegrafo. Okaze de la kunveno D-ro Carlos de San Antonio parolis pri la ekskurso al Oviedo.

Oviedo.—La Popola Ateneo monhelpis sian esperantan Grupon por organizi kaj efektiviĝi du paroladojn pri muzika folkloro kaj Esperanto. S-ro Antonio Jimenez Mora, nelacigebla pioniro de nia afero en Oviedo, aranĝis kun S-ro Julio Mangada de Madrid la du propagandfestojn. La 18^{an}. de Marto, je la 9.^a matene, alvenis al Oviedo S-ro Mangada kun medicina D-ro Carlos de San Antonio kaj lia edzino, kun S-ro Jacinto Martin, kaj kuu la ĥoreto konsistanta el F-inoj Natividad, Elena, Teresa kaj Anselma Monsell (fratinoj), Lucrecia de San Antonio kaj Carmen Cobo, kaj S-roj Alberto de San Antonio kaj Vicente Moreno (ĉiuj de la Grupo «Antaŭen»). S-ro Jimenez kun pli ol sesdek samideamoj kaj aliaj multaj esperantemuloj el la Ateneo akceptis frate la vojaĝantojn, kiuj, jam sur la persono kaj alten la verda flago, kantis la himnon de la Grupo «Antaŭen», altirante atenton ĉies kaj entuziasmigante la samideanojn de Oviedo.

Al la hotelo, kaj post rapida tualetto al la teatro «Jovellanos». La teatro plenplena. Entuziasmo, kuriozemo, intereso vidiĝis. S-ro Teodomiro Menéndez, hispane, elokvente kaj koncize prezentis S-ron Mangada kaj la ĥoreton, kaj tuj la prezentato paroladas trafante atenton kaj intereson ĉies ofte interrompate de grandaj aplaŭdadoj; sekve la ĥoreto kantadis esperante sian himnon, tiun de la Rotarioj, kaj hispanajn popolkantojn, precipe de Asturias, kiujn oni ripetadis, majstre akompanatajn piane de F-ino Anselma Monsell. Oftaj aplaŭdadoj kaj granda ovacio fine premiis la laboron de la ĥoreto.

Post la tagmanĝo okazis vizito al la Katedralo, kie oni admiris ĝiajn altvalorajn trezorojn. Je la 17.^a, regalis la gastojn per luksa lunĉo la samideanoj kaj ateneanoj kaj je la fino estis legado de popolaj versaĵoj por kantoj de Asturias kaj kantadoj.

La 19^{an}, je la sama horo, plej multenombra ĉeestantaro plenigis la teatron: la dua parolado de S-ro Mangada kompletis eksterordinare sukcese la rezulton atingitan de la unua kaj la ĥoreto ravis la publikon per svedaj, germanaj, franca, finna, pola, svisa kaj turka kantoj, finante per kanto de Asturias kaj la himno de la Hispana Esper-Asocio «Preĝo sub la verda Standardo», same dum la parolado, kiel dum la kantado, la publiko elmontris tutplenan kontenton kaj aprobon per

oftaj aplaŭdadoj. Post la tagmanĝo okazis promenado tra la bela parko kaj trinkado de pomvino en tute zamenhofa frata rondo el samideanoj kaj esperantemuloj. Fine al la stacidomo kaj tuĵ reciproka homama adiaŭa sento kortuŝis ĉiujn.

Pri la graveco de ĉi tiuj festoj tute klare diras, ke la tuta gazetaro de Oviedo kaj Gijón longe, detale, varme, entuziasme raportadis, kaj certe la rezultato estos tre fruktodona por nia afero en ĉi tiu regiono kaj sekve en la najbara Galicia.

Valencia.—En la Instituto pri Lingvoinstruado de la Universitato S-ro Manuel Caplliure, Membro de la Hispana Esp.-Instituto klarigas kurson sufiĉe ĉeestatan kaj kvankam la nombro da lernantoj ne estas tiel granda kiel estis dum la pasinta kurso, estas atentinde, ke la prokrasto por la malfermo, devigis la valenciajn esperanto-gvidantojn antaŭe malfermi alian kurson ĉe la Vegetarana Asocio pro la granda nombro da aspirantoj por lerni Esperanton, pli ol kvindek lernantoj ĉeestas ĉi tiun kurson gvidatan de S-ro Fernando Soler Valls, ankaŭ Membro de nia Instituto, kiun helpas S-ro Monleon.

La Komerca Industria kaj Navigacia Ĉambro liveris la pagon pro enregistro por lerni Esperanton en la Universitato al ĉiuj petintoj, ĉi tion ĝi faris same, kiel je la pasintaj jaroj. La Urbeŝtraro monhelpis same, kiel antaŭe, per 500 pesetoj la Valencian Grupon. Ĝus fondiĝis Frateca Grupo Valencia.

Sóller (Insulo Mallorca).—La ĉiusemajna gazeto *Sóller* komencis aperigi gazetkurson pri Esperanto. Laŭ la 1.^a leciono la kurso estos tre praktika kaj interesa. Ĉi tiu laboro estas imitinda por gazetoj favoraj je Esperanto, kaj ĝi tre bone efikos disvastigante ĉiajn necesajn konojn por lerni la lingvon. Oni invitas la publikon peti klarigojn al la Grupo de *Sóller*.

Zaragoza.—S-ro Isidoro Achón paroladis ĉe la Ĝenerala Unio de Laboristoj pri Esperanto, rimarkigante la gravecon de la Esperanto-Movado kaj konsilante la lernadon de nia helpa internacia lingvo, tial ke la nuntempa vivo, oni povas diri, ĉion internaciigas. La multenombra ĉeestantaro varme aplaŭdadis S-ro Achón.

Cheste.—Tute flrme antaŭeniras nia afero ĉi tie dank' al la konstanta laboro de nia nelacigebla samideano Mañez.

Las Palmas.—Nia tre entuziasma kaj klera samideano S-ro Ferdinando Redondo, Staba Subkolonelo, faris gravegan paroladon pri Es-

peranto, ĝiaj disvolviĝado kaj progreso, ĉe la ĉefsalono de la Komerca Klubo laŭ arango de la Popola Ateneo. Ĉeestis multenombraj personoj. kiujn interesis la konvinkanta elokventeco de la Oratoro. Pri la parolado longe raportis «La Tribuno». Espereble la esperantistoj de Las Palmas rikoltos abundan frukton dank' al la parolado de nia kunlaboranto, sed estas necese, ke ili aliĝu al H. E. A.

EKSTERLANDA

Svedujo.—De antaŭ tri jaroj Esperanto progresas eksterordinare en ĉi tiu lando. La Sveda Federacio per senkosta korespond-kurso altiris mil lernantojn dum la unua jaro kaj nuntempe estas milaroj da lernantoj, tiamaniere ke baldaŭ la rondoj studentaj Esperanton supermezuros tiujn studentajn anglan lingvon, la plej ŝatatan de la svedoj. Ĉi tiu sukceso postulas novan eldonon de la ŝlosilo po 25.000 specimenoj.

S-ro Lindhagen kaŭze de la Kongreso de Danzig, kiun li ĉeestis, proponis al la sveda Parlamento enkonduki nedevige Esperanton en kelkaj lernejoj, sed oni malakceptis la proponon; tamen elmontriĝis intereso al Esperanto, ankaŭ pro propono de la laborista komunumo de Stockolm, kiun simpatie pritraktis la estraro de la tuta socialdemokrata partio, por sama enkonduko, por ŝtata subvencio al instruado de necesaj instruistoj kaj por ke la partio disvastigu la lingvon kaj subtenu morale la esparant-movadon; kaj tiamaniere elmontriĝis la intereso, ke en la Parlamenta Domo dekkvar parlamentanoj lernas jam Esperanton. Estas ankaŭ gravaj kursoj en la Popola Domo, Beskowa Liceo kaj en aliaj lokoj, unu el ili instruas la lingvon al oficistoj el la partia kaj fakaj organizoj socialdemokrataj. Krom ĉio, la urbo Göteborg subvencias la Kongreson de Sennacieca Tutmonda Asocio per 2.000 svedaj kronoj.

RIMARKO de H. E. Je 1921^a, ĉeestis la Kongreson de Praha Karavano el Svedoj, preskaŭ ĉiuj neparolis Esperanton, kaj mi aŭdis de multaj samideanoj malaprobojn pri tiaj karavanoj; mi opiniis (kaj opinias tute male): spertigi neesperantistojn pri utileco de Esperanto per profito konvinkas pli, ol ĉia alia propagando. Eble tiu karavano portis de Praha al Svedujo la semon, kiu nuntempe jam donas abundan frukton.

FRANCIA

Parizo.—La 16^{an} de la ĵus pasinta Marto, S-ro Raoul Brandon, urbo konsilanto de Parizo, parolis ĉe la kunveno de la Urbestro pri Esperanto por Urbopolitanoj, kaj sekve estis propono. Pri ĉio raportas la *Bulletin Municipal Officiell* de la 17^a de la sama monato kaj ni elĉerpas la jenon: «La Konsilantaro, pri la propono de S-roj Raoul Brandon, Paul Fleurot kaj Calmels decidas:

Oni instruos Esperanton al kiel eble plej granda nombro da urbaj politanoj, kiuj memvole deziru ricevi ĉi tiun instruon. Oni rekompencos ĉi tiujn lastajn per sumo kies kvanton kaj manieron filksos la Administracio».

Liono.—De la 25^a ĝis la 28^a de la proksima Majo okazos la Nacia Kongreso ĉi tie, por kiu la Urbestro promesis monhelpon. M. Herriot, ministro de P. I., la Urbestro de Lyon, M. Valette, poliestro de la Rhône; M. Gheusi, rektoro de la Akademio; la Parlamentanoj de la Rhône kaj altranguloj de Popolklerigado, Teknika Instruado, Komerco, Industrio, de multenombraj sciencaj, literaturaj lokaj Asocioj, helpas aktive la aferon.

Estas tre rimarkinde, ke dum la Kongreso oni pritraktos la aferon pri plej bona kaj racia internacia organizado de la esperanta movado, kaj pri restarigo de U. E. A. tiamaniere ke ĉe ĝi ĉiu aliĝinto sin sentu tutplena membro en ĉiuj momentoj kaj cirkonstancoj.

RIMARKO de H. E. La Hispanoj opinias same, kiel la Francoj; pro tio nia Sevilla konkurso havas temon al solvo de la afero.

Rusujo.—La Registaro tre favoras Esperanton. En Leningrado estas kursoj por la Poliscistaro kaj por Tramvojoj. La popola komisararo en Armenujo rajtigis la superajn Lernejojn por instrui Esperanton.

Italujo.—La Instituto Meschini posedas lernejojn en ĉiuj gravaj urboj de Italujo, kaj la Instituto enkondukis Esperanton en la oficialan programon de siaj lernejoj.

Anglujo.—La Girls' Day Continuation School de Bourneville enkondukis Esperanton en sian programon: kvin kursoj estas kun pli ol cent lernantinoj.

Turkujo.—En Konstantinopolo vigle laboradas la Turka Esp. Asocio dank' al la laboro de S-roj Yelland kaj W. Zielinski. La adreso de la Asocio estas: Asmali Meĝiol, 62-Pera-Konstantinopolo.

Grekujo.—La ministerio de kulto kaj publika Instruado, la 28^{an} de

oktobro de 1926 dekretis favore por Esperanto, kaj la nova ministerio konfirmis la dekreton per nova pli favora: «Ateno, la 14^a de oktobro de 1927. Helena Respubliko-Ministerio de Kultoj kaj de Publika Instruo. N-ro 36-816. Al la Direktoroj de la Instruistaj Seminarioj de Elementa kaj Mezgrada Instruado. Konsiderante la gravecon, kiun en la civilizita mondo prenas ĉintage la Internacia Lingvo Esperanto, kaj opiniante, ke la Instruistoj de Elementa kaj Mezgrada Instruado akiros grandan utilon el ĝia ellerno, ni komisiis D-ron A. Stamatiadis por instrui Esperanton al la gelernantoj de la Instruistaj Seminarioj, kiuj troviĝas sub nia direkto. La Ministro: subskr. T. Nikolondis.

Svedujo.—La movado progresas mirinde pro propaganda vojaĝo de nia samideano Andreo Ĉe. La 8.^a Kongreso de Internacia Asocio de Laboristaj Esperantistoj okazos en Göteborg la 14-19. VIII, de ci tiu jaro, kaj flanke de la Kongreso oni aranĝos grandan Esp.-Ekspozicion. Adreso: Organiza Konutato de Mond-Kongreso, Box 73-Göteborg.

ROTARIA HIMNO

Hispane verkis LUIS FERNANDEZ ARDAVIN
Esperantigis JULIO MANGADA ROSENORN

Hispanrotarioj! La bono al Mondo;
La normo labori; la leĝo honor';
La Paca Kolomb' kaj Amsago, laŭ ondo
Bonporta, jam flugu al ĉies la kor'.

La helpon al frat'; por milit' abomenon;
Nur solajn deziron kaj kredon sen dub'!
Tutmondrotarioj, ni zonu la ĉenon,
Ĉirkaŭen la Tero, de nia la Klub'!

Hispanrotarioj! La nova agado,
Ludante trumpetojn, vin vokas al lukt'.
La lanco rompita, rustiĝis la spado!...
De niaj armiloj plej bona la frukt'!

Kiel oni povas rimarki, anstataŭante «Hispanrotarioj'n» kaj «Tutmondrotarioj'n» per *Tutmond-esperantoj*, ĉi tiu himno fariĝas ankaŭ nia internacia, eĉ nacia antaŭante per «Hispanesperantoj», «Francoesperantoj», «Britoesperantoj», k. t. p.

"Rotaria Himno de Hispanujo"

Versaĵo hispana de
Luis Fernández
Ardavin
Majesta marŝo

Traduki's Komponis
Julio Mangada Francisco
Rosenörn Alonso
Aoro

His-pan-rota-ri oj!

La bono al mondo; la normola-bo-ri la le-ĝo ho

nor La Pa-cako-lomb' kaj Amsaĝo laŭ on-do Bonportaĵam

Solo





klub! Hispanrolarioj! La nova a-gado dan-te
lu-trum

petojn vin vokas al lukt? Lalanco rom-pita, rusti-gista

ten *Horo*

spa-do... Deniĝar-miloj plej-bona la frukt' Hispan-
ro-tarioj la

ten *rall.*



no-va a- ga-do lu-^{dan-}te-^{ne-tojn}trum- vin vo-ka-s al lukt'!

la^{lan-} corom-pi-ta rus-ti-gis^{la} spado de ni-aj ar-mi-loj plej bo-na la

frukt'! His-pan-ro-ta-ri-oj!

(kiel êho)₃

pp cresc: cresc: f fff

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVUS ĈI TIUN GAZETON, KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIĤOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENÖRN, Glorieta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

«DON KIĤOTO» nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Santa Teresa, 16-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minime atingos 50 specimenojn; por mondo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40%. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO